



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

PILO-PRESS

salutas

la partoprenantojn ^{Eldonanto/Herausgeber:}
de la Eŭropa ^{Ludwig Pickel}
Esperanto-Kongreso ^{Postfach 2113}
^{D-85 Nürnberg 1}

Paderborn 1977

^{Tel. (09 11) 46 36 49; 5142 69}

Jara abono 30,- GM

N-ro 21/77 - 23 majo 1977
Aperas ĉiusemajne

Skriba salutvorto de la ĉefepiskopo de Paderborn por la
Eŭropa Esperanto-Kongreso

Paderborn (pp) - Lia eminenta moŝto, la ĉefepiskopo de Paderborn de-
diĉis al la Eŭropa Esperanto-Kongreso 1977 jenan skriban salutvorton:
"Kiel ĉefepiskopo de Paderborn mi kore salutas la amikojn de la Inter-
nacia Lingvo el diversaj landoj en la jubilea urbo.

La kristanoj ĉiam denove klopodas mem kunagi, por ke plenumiĝu la peto
de ilia Sinjoro, kiun li diris en sia adiaŭa parolado: Ut omnes unum
sint! - Por ke ĉiuj estu unu! Eĉ se ili scias, ke la lasta unueco
povas esti donacita nur de supre.

Komuna dua lingvo por ĉiu povas alproksimigi la homojn. Dum jarcent-
toj la latina havis ĉi tiun taskon en la eklezio kaj havas ĝin parte
ankoraŭ hodiaŭ. Tamen la eklezio ne kontraŭstaras la progreson. Es-
peranto povus esti la latina por ĉ i u j , kaj ĝi pruvis, ke ĝi
vivas. Pro tio mi speciale ĝojas, ke dum ĉi tiu eŭropa pentekosta
kongreso en nia episkopa urbo la kristanoj ankaŭ en ĉi tiu komuna
lingvo laŭdas Dion, ke ili kune celebras eŭkaristion, preĝas kaj
kantatas kaj montras sian fratan solidarecon kun ĉiuj, kiuj havas bo-
nan volon, en la interparolo de homo al homo.

"Elprovu ĉion; tenu firme tion, kio estas bona!" diras la sankta
Paŭlo en la unua epistolo al la Tesalonikanoj (1 Tes., 5,21). Ĉiam
pli da respondeculoj en la eklezio diras: Esperanto estas bona afero!

Mi deziras al la kongreso multe da sukceso kaj al la Internacia
Lingvo pluan disvastiĝon.

Johannes Joachim

Ĉefepiskopo de Paderborn "

Novajoj el Belgio

Mortsel (pp/bef) - Belgio havas sian esperantistan Senatanon. Membro
de la Belga Senato fariĝis la advokato Fernand Piot, Leuven, Delegi-
to kaj Fakdelegito pri Juro de UEA. - La 25-an de aprilo, s-ro E.
Symoens el Kalmthout bonsukcese defendis Esperanton antaŭ deko da
inspektoroj de la ministerio pri instruado. - En la "Aangenomen
College" (Akceptita Kolegio) de St. Truiden stariĝis Esperantogrupa
inter la studentoj kun aprobo kaj kunlaboro de la instruistaro kaj
direktoraro.

GEA antaŭ decida punkto

Kiu fariĝos nova prezidanto?

Pilo-Press jam kelkfoje atentigis pri la graveco de la ĉi-jara ĉefkunveno de Germana Esperanto-Asocio en Paderborn. Post la decido de d-ro Bormann, la ĝisnuna prezidanto, ne plu kandidati, necesas do trovi kaj elekti novan prezidanton.

Tiu ĉi novelekto estu okazo iomete retrorigardi en la historio de GEA. Laŭ la asocia strukturo, de la aktiveco de prezidanto dependis fakte la evoluo kaj bonfarto de la asocio. Kiuj do estis tiuj personecoj, kiuj estris kaj gvidis la asocion de la komenco en la jaro 1906?

Pilo-Press prezentas ĉi-sekve la 9 prezidantojn de GEA:

- 1) Dr. Eduard Mybs, kuracisto, Altona
Prezidanto de 1906 - 1912
- 2) Adolf Reinking, juĝisto, Braunschweig
Prezidanto de 1912 - 1920
(Dum la 1-a mondmilito li militservis; anstataŭis lin D-ro Albert Steche, Dresden.)
- 3) Dr. Albert Steche, fabrikisto kaj deputito en la Saksa Parlamento, Dresden
Prezidanto de 1920 - 1925
- 4) Dr. Ernst Kliemke, ĉefoficisto (Deutsche Bank), Berlin
(pseŭdonimo Heinrich Nienkamp)
Prezidanto de 1925 - 1929
- 5) Arnold Behrendt, poŝtkonsilisto, Berlin
Prezidanto de 1929 - 1933
La tempon de 1933 - 1936 ni ignoras, ĉar ne plu estis laŭ demokratia maniero elektita prezidanto, sed nur gvidanto eknomita laŭ la "samdirektiga" regulo.
- 6) Dr. Siegfried Ziegler, München
Prezidanto de 1946 - 1953
- 7) Dr. Wilhelm Herrmann, juĝisto, Lampertheim
Prezidanto de 1953 - 1958 kaj de 1961 - 1967
- 8) Dr. Eduard Schoen, Studdirektoro, Köln
Prezidanto de 1958 - 1961
- 9) Dr. Werner Bormann, Reg.-Direktoro, Hamburg
Prezidanto de 1967 - 1977 (?)

Kiu do fariĝos la 10-a prezidanto? Ĉu la germana Esperanto-movado havos bonŝancon? Post Pentekosto ni povos respondi la demandon!

La rolo de Esperanto-revuo

De la komenco de la Esperanto-movado en Germanujo gravan rolon ludis la revuo "Germana Esperantisto" fondita de Jean Borel. Ja Borel, la eldonisto kaj ĵurnalisto, fakte devas esti nomata la kreinto de Esperanto-movado en Germanujo. Tiun rolon "Germana Esperantisto", eldonata de privata eldonejo, ludis ĝis 1935. Post la milito saman rolon ludis Germana Esperanto-Revuo laŭ similaj kondiĉoj. Ĉu germana movado sen propra Esperanto-revuo vere povas prosperi? Ankaŭ tiun demandon la jar-ĉefkunveno de Paderborn devas respondi!

IFEF-kongreso en Britio

Swanwick (pp) - De la 13-a ĝis 20-a de majo okazis en la brita urbo Swanwick la 29-a Kongreso de Internacia Fervojoista Esperanto-Federacio (IFEF).

Sabate, la 13-an de majo, je la 9,30 horo, kolektiĝis la kongresanoj el 16 landoj por la kongresa inaŭguro en la granda halo de la kongres-ejo (The Hayes Conference Centre).

Laŭ la kongresa Bulteno n-ro 1 la kongreson salutis en Esperanto la komunumestro de Swanwick, s-ro Roger B. Ferro, la reprezentanto de la Britaj Fervojoj, s-ro Verdon-Smith, kiu anstataŭis la prezidanton de British Railways, s-ron Peter Parker, MVO.

La komunumestro de Swanwick esprimis ĝojon pro tio, ke la fervojistoj kongresas en lia regiono kaj anoncis, ke li partoprenos en pluraj kongresaj programoj. La reprezentanto de la Britaj Fervojoj, kiu ankaŭ en Esperanto parolis, diris i.a., ke ne estas hazardo, se fervojistoj sin dediĉas al komuna lingvo, ĉar la deĵoro ofte translimigas la pensojn, kaj kompreno estas necesa por ĉia progreso. Li opiniis, ke la reciproka kompreno kreskas, kio donas plian eblecon al Internacia Lingvo.

En sia malferma parolado IFEF-prezidanto Joachim Giessner menciis la fendegon inter la riĉaj kaj la malriĉaj popoloj kaj ties eble katastrofajn sekvojn kaj tuŝis la danĝeron de tio, ke la industrio konas la prezon de ĉio, sed ne la valoron. Li elstarigis la valoron de krea agado dum la libertempo, kaj tio por ni ja estas Esperanto. Tia laboro por progreso de la homaro helpas savi la personecon de homo.

Nome de PISAIC kaj IFEF s-ro Narvala skizis gravajn mejloŝtonojn en la vivo de s-ro Horace Barks, la LKK-prezidanto, kiu naskiĝis en septembro 1895. Li komencis kiel 13-jara knabo ĉe la fervojo, fariĝis urba konsilanto en Stoke-on-Trent en 1936, ricevis la ordenon OBE (Order of the British Empire), esperantiĝis en 1942, iniciatis la starigon de busto de Zamenhof en Arta Galerio de Stoke-on-Trent, inaŭguron de Esperanto-strato kaj Zamenhof-parko kaj la trinkejon "La Verda Stelo" en sia urbo Stoke.

Sabate vespere la folkloro vespero prezentis irlandan kaj kimran kulturojn.

Dimanĉe, la 14-an de majo, matene Marjorie Boulton prelegis pri "Zamenhof kaj la fervojo". Elokvente, emocie, energie, eminente ŝi interpretis la travivaĵojn, la pensojn, la vivon de Zamenhof dum liaj vojaĝoj, kiuj per fervojoj kondukis lin al universitato, al kongresoj, kaj fine - en 1914 - la longa vojaĝo reen de Köln al Varsovio tra la nordaj landoj post la eksplodo de la unua mondmilito. La vivo estas vojaĝo, kaj la vivovojaĝon de Zamenhof ŝi karakterizis kiel kalvarian vojaĝon.

Fine de la antaŭ-tagmezo Marjorie Boulton prezentis Esperanton antaŭ granda aŭskultantaro laŭ rekta metodo.

Vespere bona orkestro dancigis la pli multajn kongresanojn. Multaj kongresanoj dum la balo montris naciajn aŭ regionajn kostumojn, kiuj i.a. allogis la televidon.

Honora premio por "Mia amata Esperanto"

Luksemburgo (pp) - Dum la jara kongreso de "Arbeitsgemeinschaft für Werbung, Markt- und Meinungsforschung" (Laborkomunumo por varbado, esplorado pri merkato kaj opinio) en Luksemburgo estis dediĉita honora premio al Richard Schulz, Minden, pro lia libro "Mein geliebtes Esperanto" sur la kampo de lingvoscienco.

Novaĵoj pri la Eŭropa Esperanto Kongreso

Paderborn (pp) - S-ro Jürgen Girgensohn, kulturministro de la lando Nordrejn-Vestfalio, akceptis membrecon en la honora komitato de la Eŭropa Esperanto-Kongreso. - Prof. d-ro Ivo Lapenna, la iama UEA-prezidanto, ne partoprenos la kongreson.

Opinioj, reagoj

Laŭ sciigo de la ĵurnalo "Kniĵnoje obozrenije" (Libra Revuo) N 17/1977 en Moskvo la 6-an de septembro ĉi-jare malfermiĝos libro-ekspozicio-foiro internacia. Partoprenos ĝin ĉ. 1000 firmaoj el 50 landoj. Fine de la ekspozicio estos starigitaj la kontraktaj pri librinterŝanĝo ktp. Do, estas ja bonega okazo por ankaŭ esperantistaj eldonejoj, ke ili partoprenu. La dezirantoj aĉeti tiun E-literaturon en USSR estas laŭ "Hungara Vivo" ne malpli ol cent mil personoj.

Nikolaj Starodubcek, Doneck, USSR

Hieraŭ, post Radio Vatikana, ĉirkaŭ 5 minutojn mi sukcesis kapti vin, sed kun perturboj de alia apuda stacio. El via leterkesto mi konstatis, ke s-ro Ludwig Pickel estas via plej diligenta korespondanto, kaj mi gratulas lin: li estas vere motoro de la E-movado en Germanujo.

D-ro J. Kondor al Radio Roma (Leterkesto)

Saluton al vi! Antaŭ ĉio mil dankon pro via sincera agado per via Pilo-Press por nia benata movado.

D-ro M.H. Saheb-Zamani, Tehran, Irano

La libro de la semajno

Mendu ĉe:

<u>KREDU MIN SINJORINO!</u> de Cezaro Rossetti, 2-a eldono	Ludwig Pickel
Aŭtobiografia romano originala	Libroservo
13,2 x 19,2 cm, broŝ., 260 p.	7,- GM Postfach 2113
	8500 Nürnberg 1

Noveldonaĵoj

Katalogo de la planlingva literaturo de la universitata biblioteko Saarbrücken, Reinhard Haupenthal, SEL Saarbrücken 1977	
14,5 x 20,4 cm, broŝ., 50 p.,	9,-- DM

Anonceto

Bielefelda esperantisto serĉas samideanon cele konversacion kaj korespondadon. Interesuloj skribu al: S-ro Joh. Schalk, Lipper Hellweg 32, D-4800 Bielefeld.
--

Esperanto en Radio

Varsovio. En la pasinta semajno Pola Radio disaŭdigis komenton pri la mistera morto de pola studento en Krakovo, pri kiu ankaŭ raportis la amasmedioj en okcidento. El tiu komentario ni publikigas jenajn citaĵojn: "La vero pri la Krakova provoko. Parto de la amaskomunikiloj en la okcidento precipe de tiuj kiuj ĉiam serĉas la okazon por makuli en la okuloj de siaj legantoj kaj spektantoj Pollandon kaj la polojn vaste skribas pri murdo de studento en Krakovo. Oni funkciigis diversajn kanalojn de informado al la centrejoj de la propaganda antipola diversio en la okcidento. Konataj pro siaj antisocialismaj elpaŝoj kaj internaciaj ligitecoj ludantoj politikaj alpaŝis al la agado muntante por tiuj centrejoj pseŭdo-informojn kaj pseŭdo-argumentojn ĉe kiuj ili preterlasis tutece faktojn kaj ankaŭ opiniojn publikigitajn en la pola gazetaro. Jen la faktoj koncernantaj la tragikan morton de la studento en Krakovo kolektitaj de reprezentanto de la ĵurnalo "Zycie Warszwie": La 7-an de majo de la kuranta jaro je la 6-a horo 50 minutoj la loĝantoj de la domo...en Krakovo trovis sur la parteroj de la ŝtuparejoj kadavron de viro. Oni informis pri tio senprokraste la deĵoranton de la milico. Oni alvokis ambulancan. La alveninta kuracisto konstatis morton. La mortinto montriĝis Stanislaw Byas, studento de la 5-a kurso de la Pola Filologio de la Jagellona Universitato loĝanta en studenta hotelo..... La enkondukaj esploroj montras ke St. Byas mortis inter la 3-a kaj 4-a horo tiu-matene. La lezoj sur lia korpo montras ke ili povas esti rezulto de falo....."